

**INFORMILO DE KKE — KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ**

Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. — Av. Treze de Maio, 47, sobreloja 208 — Centro  
Rio de Janeiro - RJ — CEP: 20031-921 - Tel:(21) 2544-4314 Fax: (21) 2220-7486  
retoŝta adreso: esperanto.kke@gmail.com; ttt-paĝo: [www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)

**Nº 56****9ª JARO (NOVA FAZO)****MAJO-JUNIO / 2010****FABIANO HENRIQUE PRELEGAS**

**La juna FABIANO HENRIQUE prelegas en la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio la 16-an de Aprilo 2010 pri la temo LA DISVASTIGADO DE ESPERANTO PER RADIO EN BRAZILIO.**

## Eventos

Mar, 1 – Roda Literária / Prosa em esperanto / Coordenação: Aloísio Sartorato.

Mar, 3 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Mar, 5 – Palestra de Floriano Pessoa sobre “Kiu timas la Plenam Gramatikon?”, com a presença de 13 pessoas.

Mar, 8 – Roda Literária / Poesia em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Mar, 10 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Mar, 12 – Palestra de Luiz Carlos Taveira sobre “Taiguara, o senhor de si”, com a presença de 16 pessoas.

Mar, 15 – Roda Literária / Literatura brasileira em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Mar, 17 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Mar, 19 – Palestra de Alfredo Aragón sobre “Kolombia Muziko”, com a presença de 16 pessoas.

Mar, 20 – Projeto “Conheça o Rio a pé” / Visita à praia e ao Forte de Copacabana e Aldeia dos Pescadores / Coordenação de Laura Pereira de Alcântara.

Mar, 22 – Roda Literária / O estilo de Zamenhof /

Coordenação de Aloísio Sartorato.

Mar, 24 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Mar, 26 – Festa dos Aniversariantes com a participação especial de Dirce Salles (canto) e com a presença de 20 participantes.

Mar, 29 – Roda Literária / Teatro em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Mar, 31 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Abr, 5 – Roda Literária / Prosa em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Abr, 7 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Abr, 9 – Não houve reunião em virtude das chuvas torrenciais.

Abr, 12 – Roda Literária / Poesia em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Abr, 14 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

Abr, 16 – Palestra de Fabiano Henrique sobre “La Disvastigado de Esperanto per Radio en Brazilo”, com a presença de 11 pessoas.

Abr, 17 – Projeto “Conheça o Rio a pé” / Visita ao Espaço Cultural da Marinha e Ilha

Fiscal / Coordenação de Laura Pereira de Alcântara.

Abr, 19 – Roda Literária / Literatura Brasileira em esperanto / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Abr, 23 – Não houve reunião em virtude das chuvas torrenciais.

Abr, 26 – Roda Literária / O estilo de Zamenhof / Coordenação de Aloísio Sartorato.

Abr, 28 – Clube de Conversação / Bate-papo com Jair Salles.

## Doações para a Caixa Geral

Elma do Nascimento: R\$ 224,50; José Carlos Dias Pinto: R\$ 500,00.

*Dankegon al ĉiuj!!!*

## Doações para a Campanha Esperanto nas Bibliotecas

Maria G. Carâp: R\$ 15,00.

*Koran dankon !!!*

## Expediente

*InKo*, boletim informativo da Cooperativa Cultural dos Esperantistas; edição nº 56, maio-junho 2010.

Coordenação: Givanildo Costa  
Redação: Aloísio Sartorato  
Revisão: Célio Freitas Martins

## **ESTIS KREITA EN MARTO NIA ESPERANTA INSTRUA KOMISIONO**

Kiam decidaj procedoj fariĝas inter ni, parolantoj de la belsona lingvo Esperanto, post tiom da nekomprenaj kaj vanaj diskutoj, jar-post-jare, kiuj pro ilia amplekso jam devus esti starigitaj en niaj kutimaj interrilatoj, tio por mi sonoras kiel eĥo de iu cimbala sono atinganta la translimon de nia esperantista kapablokompreno.

Tio signifas ke ni, geesperantistoj, almenaŭ el Rio de Janeiro, urbo kaj ŝtato komencas transpasi la stagnajn barojn de la pseŭda venko pro la fakto de la Internacia Lingvo esti iomete konata, aŭ kiel pensas kelkaj veteranoj, laŭ la plej fama frazo de la Zamenhofa poeziaĵo “La Vojo”, ke oni jam atingis “la celon en gloro”.

Miaj entuziasmaj unuaj vortoj en ĉi tiu artikolo rilatas al la ĵus fondita komisiono, kiu celas kunordigi la instruadon de Esperanto en nia ŝtato sub la aŭspicio de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro (AERJ).

Kun certeco, tiu E-movada decido devigos al la homoj de nia regiono, kiuj instruas la Idiomon, pli serioze zorgi pri la E-lernigo kaj fariĝi pli kapablaj instruistoj, kaj ne kiel ni vidas nuntempe, kie homoj kiuj lernigas la Lingvon, pro manko de Instrua Esperanta Institucio fariĝas instruistoj ĝis kiam ili sentas sin instigitaj aŭ restas dum sia tuta vivo eternaj bazaj instruistoj de la Lingvo.

Mi esperas ke tiu iniciato estu apogata de ni ĉiuj, precipe de la esperantaj grupoj el la ŝtato kaj ĉefurbo, kaj ke ankaŭ tiu starigo okazu en aliaj brazilaj ŝtatoj kaj regionoj, ĉar ĝi plifortigos la naciskalan Esperantan Instruan Komisionon de BEL, kaj sekve de ILEI.

Mi gratulas al AERJ kaj ĝian unuan direktoron, S-ano Márcio Santos, kaj la aliaj anoj de la Komisiono, kiuj estas Luiz Alberto Coelho, Carlos Valle, Aloísio Sartorato, Jair Salles, Elmir dos Santos Lima, Paulo Carvalho, Walter Rosa, mi kaj, kompreneble, aliuloj estontaj.

Bonan profitan instruan laboron al ĉiuj estas niaj KKE-deziroj.

**Givanildo Ramos Costa**

# KIU TIMAS LA PLENAN GRAMATIKON?

Floriano Pessoa

## 1. Enkonduko

Duonjarcenton post la publikigo de la unua libro de Esperanto, la eldonejo Literatura Mondo lanĉis gramatikon, verkitan rekte en la Lingvo Internacia, kun la titolo “Plena Gramatiko de Esperanto”. La aŭtoroj, tre kompetentaj esperantologoj, baldaŭ komencis ricevi leterojn kun protestoj kaj plendoj de siaj legantoj. Kial?

Nu, la nova gramatiko estis konsiderinde pli dika ol la Unua Libro, kaj ol la tiamaj lernolibroj. Plie, la teknika terminaro uzita por priskribo de la lingvaj fenomenoj ŝajnis tro komplika por ordinara leganto. La ĝenerala impresio estis, ke, laŭ la nova lernilo, Esperanto ne plu estas tiu 16-regula 900-vorta miraklo, lernebla en kelkaj monatoj. Sed, evidente, pri tiu ŝvelado de la lingvo oni ne povas kulpigi Kolomanon Kalocsay kaj Gaston Waringhien, kiuj nur konstatis kaj registris la lingvan evolu-staton. Laŭ tiuj aŭtoroj, la gramatiko tiugrade kreskis, por ebligi la detalan studadon de ĉiuj lingvaj faktoj troveblaj en la jam tre riĉa Esperanta literaturo.

Pri la gravega kolekto de ekzemploj Zamenhofaj, - bazo por starigo de gramatikaj reguloj - oni plendis, jen opiniante nesufiĉaj, jen tro multaj, la ekzemplojn.

Kaj ĉe tiom da akuzoj, devis defendi sin la aŭtoroj de la “Plena Gramatiko”:

“Oni riproĉis al ni la komplikecon. Nu, ĝi estis neevitebla. Por pritrakti detale vivantan lingvon, oni devas ĝin aranĝi en kadroj, se oni ne volas fali en la ĥaoson de neligitaj splitaj rimarkoj. Krome, ĉar temas pri internacia lingvo, ni devis forĵeti ĉiujn naciajn sistemojn kaj konstrui ian absolutan gramatikon bazitan nur sur la racio. Ni devis do fari sisteme la tutan skeleton de la homa lingvo por meti sur ĝin la vivantan karnon de Esperanto”.

Malgraŭ ĉiuj plendoj, la verko rapide disvendiĝis, kaj atingis la kvaran eldonon en 1980, nun kun la titolo “Plena Analiza Gramatiko” (PAG).

## 2. La enhavo de PAG

Atenta ekzameno de la enhavo de PAG montras, ke ĝi estas farita laŭ tradiciaj klasikaj modeloj, aplikeblaj al aliaj lingvoj de Eŭropo. Oni studas unue LA VORTON, poste LA FRAZON kaj, kun aparta emfazo, LA VORTFARADON, tre gravan procedon en Esperanto. La studo de la vorto fariĝas laŭ la kutima divido: Ortografio, Fonetiko, Morfologio. Tiu ĉi lasta havas kiel studkampon: substantivon, pronomon, adjektivon, adverbon, verbon ktp.

Por la studo de LA FRAZO, tio estas, de SINTAKSO oni konsideras VORTSINTAKSON kaj PROPOZICIO-SINTAKSON. Tiu ĉi lasta pritraktas la diversajn fraz-tipojn simplajn kaj kompleksajn.

Ĉar la terminaro rilata al Sintakso estas iom pli komplika, kaj ĝenerale malpli konata, tial mi serĉis, bonŝance trovis, kaj nun disdonas al vi bonegan Resumon pri Sintakso, faritan de Kalocsay, por iu elementa lernolibro “La Verda Koro” de Julio Baghy.

### 3. Opinioj pri la PAG; recenzoj kaj komentoj.

La kvara eldono de la PAG, kiu aperis en 1980, kun nova titolo “Plena Analiza Gramatiko” – estis temo de tre detala recenzo, farita de la finna lingvisto Jouko Lindstedt, kaj, publikigita en 1982, pere de Planlingvistiko. Tiu tri-parta recenza eseo forte impresas, ne nur pro la alta teknika nivelo, sed ankaŭ pro la senpartieco kaj sincereco. La recenzanto ne hezitas montri mankojn kaj erarojn, sed ankaŭ agnoskas la neordinaran meriton de la aŭtoroj. Jen kelkaj deklaroj de Lindstedt:

-... la trezoron de ekzemplaj frazoj, plejparte Zamenhofaj, pri ĉiu unuopa gramatika ero jam pro tiuj ekzemploj indas posedi PAG-on...

Sekvas la parto “Fonetiko, bedaŭrinde. Bedaŭrinde, ĉar ĝi estas preskaŭ ĝisfunde neĝusta, diletante kaj misgvida, sub la nivelo de la cetera verko.”

- En la ĉapitro pri la verbo kvazaŭ kulminas la ĉefa trajto de PAG: admirinde detala kaj sentema analizo en konfuza vesto. La problemo ata-ita estas kompreneble solvita “itisme”, ĉar la lingvo jam ĝin tiel solvis jam antaŭ la fama diskuto ekestis, sed oni maskas la veran naturon de tiu solvo, nome, ke aspektaj trajtoj interplektiĝas kun la tempaj, pro certaj lingvaj universalaj, laŭ mia opinio.”

“PAG-on mi rekomendas sur la breton de ĉiu esperantisto, ne por elĉerpi el ĝi detalajn preskribojn, sed por konatiĝi, pere de ĝi, kun la senfina vasto de la lingvaj fenomenoj kiujn niaj du grandaj gramatikistoj tiel bone konas.”

### 4. Konkludo

La mankoj kaj eraroj menciitaj en ĉi tiu prelego ne forprenas la valoron de tiu vera monumento de la Esperanta kulturo, la Plena Analiza Gramatiko. Ĝi plue restas nemalhavebla konsultilo, kaj bazo por la uzado de aliaj pli modernaj, resumaj kaj praktikaj lernolibroj. Inter ĉi-lastaj mi citas: “ABC-Gramatiko kaj Mempraktikilo” (Van Damme/de Vleminck); “Gramatiko de Esperanto” (Malovec); “Vojaĝo en Esperanto-lando” (Kolker) kaj, la “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko” (Bertilo Wennergren).

Sed atentu, legi la “Plenan Gramatikon” ne nepre aperigas ian infanmanĝanton aŭ lupkoboldon: do ne timu ĝin!

*(Teksto de prelego farita de samideano Floriano Pessoa en la sidejo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en Ro de Janeiro, la 5-an de Marto 2010)*

## O FIM DOS CAMBUCÁS

de Sylla Chaves



**Cambucá, tu descreves claramente  
o fim previsto para o mundo atual.  
Tens o auriverde com que nossa gente  
provou que este Brasil não tem rival.**

**Vivias bem, nessa floresta ingente  
que assombrou a maruja de Cabral,  
mas a cobiça veio e, de repente,  
cedeste teu lugar ao cafezal.**

**Teu sabor encantou gente de fora.  
Encheste nossas feiras e canções.  
Mas veio aquele monstro, que devora**

**tudo que é bom com dentes de cifrões.  
Diz, Cambucá, onde é que estás agora?  
Vem consolar os nossos corações!**

*(En la 16-a de Novembro 2008, Sylla Chaves verkis ĉi tiun belan portugallingvan poemon omaĝe al la arbo "Kambukao". Plenumante lian deziron, antaŭ unu jaro liaj cindroj estis ĵetitaj sub arbon Kambukao en la bieno Esperanto, de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en Rio-de-Janeiro).*

## O Esperanto no Rádio: no ar, mais um campeão de audiência!

Fabiano Henrique

Talvez por ser um dos mais ágeis e diretos meios de comunicação, o rádio vem ocupando, ao longo dos anos, local de destaque na difusão do esperanto. No Brasil, em particular, a radiofonia tem sido uma das mais importantes tribunas para a defesa e o ensino da língua. Inúmeros têm sido os divulgadores que desfraldaram a bandeira verde em nosso país. Está no ar um esboço da trajetória do esperanto no rádio!

Oficialmente, o rádio brasileiro nasceu no dia 7 de setembro de 1922. A primeira emissora regular, porém, somente veio a ser implantada no ano seguinte por Edgard Roquette Pinto, com o apoio da Academia Brasileira de Ciências. Embora pouco se fale, há registros de que em 1919 entrara em operação a Rádio Clube de Pernambuco.

A programação radiofônica, em seus primeiros anos, era voltado para a educação e a cultura. Sob tal inspiração, Roquette Pinto convidou, em 1924, o professor Couto Fernandes a iniciar um curso de esperanto pela Rádio Sociedade. A documentação que resistiu ao tempo, entretanto, não fornece dados precisos acerca de datas e de duração das aulas. Ambos, contudo, entrariam para a história como pioneiros: Couto Fernandes por ser o primeiro a falar de esperanto no ar e Roquette Pinto por abrir espaço para o idioma na mídia.

Em fins da década de 30 e início da de 40, Ismael Gomes Braga assumiria o posto de divulgador do esperanto pelas ondas hertzianas. João Pinto de Souza lhe abriria espaço na Hora Espiritualista irradiada pela Rádio Transmissora do Rio de Janeiro – atual Rádio Globo. Cedo, Gomes Braga percebeu o potencial do novo meio de comunicação e os benefícios que este traria ao movimento esperantista. Nascia assim o tríplice ideal Evangelho – Espiritismo – Esperanto. Sob essa divisa, ele escreveu artigos para as revistas como *Brazila Esperantisto* e *Reformador*, alguns dos quais enfeixados no livro *Veterano*.

A chamada era de ouro do rádio não poderia passar em branco para o movimento esperantista. Os anos 50 foram possivelmente os mais fecundos para o esperanto. Em Belo Horizonte, a Rádio Inconfidência transmitia em ondas curtas o programa *Brazila Kroniko*, para cuja redação chegavam correspondências de várias partes do Brasil e do mundo. Por volta de 1955, a pioneira Rádio MEC – então Rádio Ministério da Educação e Saúde – voltou a tratar do esperanto. Transmitiam-se aulas semanais, com músicas e rádio-teatro. Nesse período surgiu Joel Manso, um dos maiores ícones do rádio esperantista brasileiro. Ainda nessa época, Jorge das Neves e Carlos Torres Pastorino eram convidados por Alziro Zarur a iniciar, pela Rádio Mundial, um dos mais famosos cursos do idioma, o qual inclusive foi tema de crônica na grande imprensa.

O panorama do rádio esperantista não mudaria muito na década de 60. Joel Manso comandava Música e Notícias, pela Rádio MEC, e Jorge das Neves continuava seu curso, pela Mundial. Em fins de 1964, porém, a cidade-sorriso entraria em cena. A direção da Rádio Difusora Fluminense cedeu ao Niterói Esperanto-Klubo meia hora, aos sábados pela manhã. Sob a coordenação de Joaquim do Couto, Torres Pastorino ministrou a aula inaugural. Por sua vez, pela Rádio Jornal do Brasil, a Cooperativa Cultural dos Esperantistas divulgaria músicas ao longo da programação, colaboraria com respostas no programa Pergunte ao João. Por fim, no interior de São Paulo, Manoel Blaz iniciaria seu Clube de Esperanto, pela Rádio Clube de Sorocaba, atual Rádio Boa Nova.

Uma das mais belas páginas da história da radiodifusão esperantista seria escrita a partir dos anos 70. Precisamente no ano de 1977, entendimentos entre Geraldo de Aquino e Francisco Thiesen, então presidente da FEB, possibilitaram o início do programa Evangelho – Espiritismo – Esperanto, na Rádio Rio de Janeiro. Coube a Affonso Soares a tarefa de produzir e apresentar a atração semanal. A partir de então, a Rádio Rio de Janeiro seria a emissora brasileira a dar mais espaço ao esperanto.

Entre 1982 e 1984, a Liga Brasileira de Esperanto patrocinou o programa Uma Ponte sobre o Mundo. As notícias da semana esperantista eram apresentadas por Joel Manso e Dagmar Basílio. A atração era veiculada pela Rádio Copacabana. Anos depois, Edgard Machado e Celso Pinheiro comandariam, na Rádio Guanabara/Bandeirantes, Esperanto, Língua Internacional.

Para a emissora da fraternidade, Gilka Fernandes convidou Givanildo Ramos Costa no final de 1986. Nascia então a série Esperanto, 100 anos de Amor, nome alterado em 1999 para Esperanto, a Língua da Fraternidade. Fundava-se, como consequência, o Departamento de Esperanto da Rádio Rio de Janeiro.

Como aliar a difusão do esperanto às novas técnicas de apresentação no rádio? Após alguns anos, Givanildo encontraria a resposta. Aos poucos ele formou uma equipe de locutores e redatores que iniciou uma nova era da radiodifusão esperantista. Foram somados os talentos do tarimbado Joel Manso e o de Renaud Hetmanek; abriu-se espaço para novatos como Julieta Rocha, além de arregimentar para o programa o elenco de comunicadores da Rádio Rio de Janeiro. Ao criar, em 2001, a home-page Central de Notícias Esperantistas, a equipe de Givanildo Costa simultaneamente estabeleceu o primeiro serviço noticioso do esperanto em português, além de ter sido o primeiro programa da emissora da fraternidade a ser veiculado na Internet. Como resultado, Esperanto, a Língua da Fraternidade, alcançou e manteve a histórica marca de quarto lugar no IBOPE, fato noticiado em todo o mundo.

O século XXI chegou e, com ele, chegou ao grande público uma série de novas tecnologias e mídias. Surgiram fenômenos da Internet, das novas técnicas de gravação e reprodução de som e imagem. Tudo isso, porém, é uma nova história que está por ser escrita. Dos velhos tempos permanece o entusiasmo dos locutores e apresentadores esperantistas. A luta, o suor, as dificuldades e a força de vontade são as mesmas desde Couto Fernandes – o amigo ouvinte sabia?



# METODOLOGIA PROPONO POR POSTBAZA KURSO DE ESPERANTO

Aloísio Sartorato



Oni kutimas disanonci en niaj propagandiloj, ke Esperanto estas facila lingvo. Parte tiu aserto estas vera, sed estus pli saĝe se oni dirus, ke **ĝi estas relative facila kompare al aliaj lingvoj**.

Praktike la tutan gramatikon de la lingvo oni povas instrui en baza kurso dum ses monatoj, se oni konsideras la brazilan lernanton. Sed la problemo ekestas, kiam finiĝas la baza kurso kaj la lernanto devas komenci uzi la lingvon. Kio okazas?

En Brazilo, la komencanto estas ordinaro simpla homo, ĝenerale maljuna, kiu scipovas nur la portugalan lingvon. Do lia menso estas programita por la portugala lingvo kaj en sia naiveco li pensas, ke ĉiuj lingvoj de la mondo havas la samajn trajtojn. Por li, ekzemple, “adjektivo ĉiam postsekvas substantivon”. Tial tutnormale li preferos diri “knabino bela” anstataŭ “bela knabino”. Aŭ li preferos la kompleksan verboformon “ĉu vi estas bone fartanta?” anstataŭ la simplan “ĉu vi fartas bone?”. Aŭ, ekzemple, uzi la pronomon antaŭ infinitivo kiel oni faras en la portugala lingvo: “oni ne plu havas vakan lokon por mi resti” anstataŭ la korekta esperanta formo “ne plu estas loko por ke mi gastigu”. Kaj ankaŭ ni ne forgesu la malfacilecon, kiun li trovas en la uzado de la akuzativo, afero tute neekzistanta en la portugala lingvo.

Estas evidente, ke saĝa instruanto rekomendos al la novuloj legi tekstojn en la nova lingvo por alproprigi ne nur la bonan kaj fluan stilon, sed ankaŭ por alkultimiĝi pensi en la lingvo mem. Ĝenerale oni adoptas legolibron kaj en klaso instigas la lernanton uzi la lingvon, sed kompreneble ne ĉio glate iras.

Iam mi legis en didaktika libro, ke la laboro de la instruisto koncentriĝas en 70% de la klasĉambro, ĉar 15% de la gelernantoj estas nature talentaj kaj lernos eĉ sen la ĉeesto de instruisto, dum la ceteraj 15% de la gelernantoj estas tiom aĉaj, ke eĉ kun la plej kompetenta instruisto ili ne sukcesos lerni. Do la sukceso de la lernado de tiuj 70% de la klaso dependos de la instruista laboro. Kaj ĉi tie gravos la elekto de la didaktiko aplikota.

En la dua semestro de la pasinta jaro mi decidis provi alternativan metodologion por la postbazaj kursoj, kiujn mi gvidas ĉe Niterói Esperanto-Klubo kaj Kultura Kooperativo de

Esperantistoj. Por la du klasoj mi elektis simplan legolibron: Facila Skeĉalbumo, de Bertram Potts. Temas pri simplaj tekstoj, unupaĝaj, kun dialogoj. La frazoj estas mallongaj kaj ĝenerale rilatas al situacioj de la ĉiutaga vivo.

En la unua triono de la leciono mi elektas duopon da gelernantoj por roli kiel personoj A kaj B de la skeĉo. Tion mi faras plurfoje kaj tiel mi havas okazon atentigi pri la ĝusta prononco de kelkaj vortoj. Ĝenerale brazilaj gelernantoj misprononcas la literon "ĉ" pro influo de la portugala. Aŭ ili ne korekte prononcas la vortojn pro misatento al la regulo "unu vokalo = unu silabo". Poste kun la helpo de la tuta klaso mi kuntradukas la tekston. Denove mi havas okazon atentigi pri la ĝusta traduko de kelkaj vortoj. Tiam mi ankaŭ profitas la okazon por atentigi ilin pri la regula derivado de vortoj en Esperanto. Ekzemple, se en la teksto aperas la vorto "kanti", mi proponas al la klaso, ke ili diru kiujn vortojn oni derivas de la radiko "kant". Kaj kompreneble mi listigas iliajn proponojn sur la tabulo (kant-o, kant-ant-o, kant-ist-o, kant-em-a, kant-obl-a, kant-ist-ar-o ktp.).



Fininte la studon de la teksto, en la dua triono de la leciono, mi proponas, ke ĉiu lernanto konstruu frazon surbaze de vorto de mi elektita el la skeĉo ĵus studita. La frazoj povas esti demandaj aŭ ne demandaj frazoj kaj mi skribas ilin sur la tabulo. Estas evidente, ke en multaj el la proponataj frazoj ekzistas eraroj. Kion mi faras? Unue mi demandas al la klaso: Ĉu la frazo estas korekta? Se ne, indiku al mi la eraro(j)n. Preskaŭ ĉiam la plej talentaj tuj trovas la eraron kaj proponas la ĝustan konstruon. Do mi profitas la okazon por atentigi ilin pri la eraro farita kaj preskaŭ ĉiam la eraro okazas pro la influo de la portugala lingvo.

Kompreneble mi profitas la okazon por atentigi ilin pri tio kaj kiel estas konate "la ripetado estas unu el la manieroj fiksi tion, kion oni lernas.

Nur en la lasta triono de la leciono mi faras liberan konversacion inter ili. Mi elektas vortojn el la teksto kaj proponas, ke oni parolu pri tiu vorto en frazoj ligitaj al la vivo de la lernanto. Ekzemple, se mi elektas la vorton "patrino", oni povas fari plurajn praktikajn frazojn kiel la jenajn: "Kiel nomiĝas via patrino?", "Ĉu ŝi estas vivanta aŭ mortinta?", "Kiomjara ŝi estas?" ktp. La gelernantoj ĝenerale bone respondas al tiu propono kaj aktive partoprenas en la libera babilado.

Kiel mi informis en la komenco, la metodologio aplikata estas ankoraŭ en prova stadio. En la unua semestro de ĉi tiu jaro mi denove provos ĝin kaj estontece mi povos informi vin pri ĝia efikeco. Sed pri unu afero mi garantias al vi: la gelernantoj ege ŝatas la sinsekvon de la leciono kaj ĉiuj senescepte aktive partoprenas ĝin.

## DEVE HAVER PALESTRAS GRAMATICAIS EM CONGRESSOS?

**1 – OS TEMAS SÃO QUASE SEMPRE OS MESMOS...** – Em nossa longa experiência, notamos que os temas das “palestras gramaticais” são, em geral, o acusativo, os participípios, as preposições, etc. Na realidade, em nossa observação, chegamos à conclusão de que, em última análise, a maioria dos alunos encontraria, no estudo do Esperanto, 7 questões “mais delicadas”, ou seja: (1) o **acusativo**; (2) os **correlativos**; (3) as **preposições**; (4) os **participípios**; (5) o **pronome reflexivo “sia”**; (6) os **sufixos “ig / iĝ”**; (7) a **aglutinação** própria do Esperanto. Note-se que justamente esses 7 assuntos mais importantes receberam atenção especial no “Suplemento Gramatical” do nosso livro “LA KONVERSACIA KLUBO” (Curso de Aperfeiçoamento). Para facilitar a compreensão, usamos os necessários artifícios didáticos (ou seja, os chamados “macetes”), que costumamos apresentar em nossas obras.

**2 – É POSSÍVEL ASSIMILAR BEM TAIS ASSUNTOS EM CONGRESSO?** – Em nossa observação, a maioria dos participantes parece não aproveitar bem as explicações gramaticais dadas em congressos. Há vários fatores que atrapalham: alguns perdem o início da palestra, que, às vezes, é muito importante para o bom entendimento do assunto. Outros precisam “dar uma saidinha” por algum motivo particular, o que ocorre principalmente com os organizadores do evento, que precisam cuidar dos diversos problemas que surgem naturalmente. O que nos parece mais preocupante é a impressão de que a maioria dos ouvintes não tem uma base mínima sobre o tema, o que, naturalmente, quase impossibilita algum aproveitamento. Fica mais complicado quando a palestra gramatical é feita diretamente em Esperanto. Ora, se os ouvintes já fossem capazes de entender uma palestra “diretamente” em Esperanto, sobre temas por si mesmos um tanto complexos, parece-nos que tais ouvintes não mais teriam as dúvidas tratadas nas próprias palestras.

**3 – CONCLUSÃO: DEVE OU NÃO HAVER PALESTRAS GRAMATICAIS?** – Achamos que sim... No entanto, tomamos a liberdade de sugerir que os participantes de tais palestras gramaticais façam um esforço, aliás não muito desgastante, no sentido de se prepararem, o melhor possível, sobre tais assuntos. Fazendo isso, até poderiam quase que dispensar tais palestras. No entanto, já tendo a aludida base, a participação do ouvinte poderá tornar-se um verdadeiro “prazer linguístico”. Isso porque, já tendo o necessário conhecimento básico, o ouvinte poderá, nessa palestra, descobrir mais detalhes enriquecedores, os quais, então, em vez de dar-lhe a ideia de que o Esperanto “não é nada fácil como dizem”, poderão levá-lo a vislumbrar as nuances de lógica e elegância que só os mais estudiosos têm o privilégio de perceber. Para ter uma boa base da gramática do Esperanto, em nosso país, costumava-se estudar a fundo o famoso livro “Esperanto Sem Mestre” (de Lorenz – com grande acréscimo de Porto Carreiro). Sabe-se, porém, que quando esse livro foi editado, há várias décadas, pelo citado Lorenz, era um método mais acessível. Com a contribuição de Porto Carreiro, o nível do livro passou de “básico” para “superior” – e isso, infelizmente, tornou-o acessível apenas àqueles que já tivessem uma base gramatical mais abrangente. Mas, como já dissemos no “Suplemento Gramatical” do nosso livro “LA KONVERSACIA KLUBO” (Curso de Aperfeiçoamento), os aludidos “macetes” parecem realmente facilitar aquelas 7 questões mais delicadas, citadas no 1º parágrafo acima, as quais passam, então, a mostrar-se bastante acessíveis... Se você ainda não conhece o citado livro, peça-o à nossa Cooperativa ([www.kke.org.br](http://www.kke.org.br)). Esperamos, assim, que você tenha um bom aproveitamento...

**OBS.** – Para explicações gramaticais muito detalhadas, no próprio Esperanto, consulte (**gratuitamente**) o excelente Manual Gramatical do Bertilo, pela internet (<http://bertilow.com/pmeg>) – ou adquira a versão em forma de livro através da Liga Brasileira de Esperanto ([www.esperanto.org.br](http://www.esperanto.org.br)).



Dirce Sales sin prezentas en la Festo de la Datrevenantoj de Marto 2010



La brava veterano Floriano Pessoa prelegas pri la temo "Kiu timas la Plenan Gramatikon?"



Samideano Alfredo Aragón prelegas pri Kolombia Muziko



La pianisto Leandro Martins Turano babilas kun la publiko